

Venontaj kunsidoj:

- Lu, la 7-an de septembro
Elisabeth prelegos ...
- Lu, la 5-an de oktobro
M.-Antoinette prelegos ...
- Lu, la 2-an de novembro
Decidota ...

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe : eventaservo.org/o/LES

Ni ekskursos ... sabate, la 20-an de junio ni vizitos la oleo-muelilon de *Severy* (ni manĝos pastaĵojn en la restoracio *O Sole Mio* * fr 20.-) kaj la ĉevalan muzeon en *La Sarraz*


La komitato proponas al vi viziti – matene - la **Oleo-Muzeon de Severy** kaj posttagmeze la **Ĉevalan Muzeon** apud la kastelo de **La Sarraz**.

Bedaŭrinde la kastelo estas renovigata ĝis aprilo 2021, do ne vizitebla.

Pro virusa risko ni ne uzos la publikajn transportilojn; ni veturos per personaj aŭtoj.

Rendevuo en la Vallombreuse je 9h30 por organizi la vojaĝon.

Bonvolu voki Francisko (076 411 14 55) por aliĝi kaj klarigi, ĉu vi venos per veturilo aŭ sen.



La 4-an de majo, Karlota prelegis perrete pri sia esperantista vivo.

KIAM, KIAL KAJ KIEL MI LERNIS ESPERANTON

Se vi deziras ricevi ŝian prelegon, mendu ĝin al sekretario@eo-l.ch.

Ĝis 7 membroj de LES “enĉambre” ĉeestis kaj plie iu, kiu skribis al nia retadreso por partopreni la kunsidon. Prezintis sin kostarika junulo - Silvio Curtis - kiu aktuale studas en Los Angeles (Usono).



Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

Komitato 2020

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

La komitato informas:

Nia programo aperas en <https://eventaservo.org/o/LES>

Babiladaj Rondoĵ

Ambaŭgrupe je 18h30:

*** SE EBLAS ***

Vendrede, la 29-an de majo
ĉe Charlotte Blanc Maillard,
av. Nestlé 9 en Vevey
aŭ laŭ la vetero
pikniko borde de la lago
079 393 32




Vendrede, la 12-an de junio
ĉe Francisko en Laŭzano
076 411 14 55

LA LAŬZANA ESPERANTO-SOCIETO prezentas sin ...

La Svisa Esperanto-Societo lanĉis kadre de la *Svisaj Esperanto-Tagoj 2020* en Zuriko *Esperanto-Etfilm-Konkurson*.

La temo estis «**Unueco en diverseco**». Nia asocio proponis filmon de 10 minutoj: <http://esperanto.ch/etfilmkonkurso/filmoj.html>

Nia filmo ricevis la 3-an premion kaj kandidatos ankaŭ al la publika premio atribuita sabate la 17-an de oktobro en la *Centro Karl der Grosse* (Zuriko).



HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

- Blua spaco super nia kapo (akuzativo); 6. Scienco havas ___ enuan, sed frukton bonguan; 11. Metis ordon; 12. Ne estigi certa; 13. ___ sinjoro (komence de letero); 14. Simila al brila blanka globo; 15. Frakcio kun numeratoro egala al unu; 16. Senti bezonon trinki; 17. Lingva kodo de Esperanto; 18. Difina artikolo; 19. Don Giovanni estas ___ de Mozarto; 20. Tut-Tera Teksaĵo; 21. Dividiĝas nur per si kaj per 1; 22. Klopoti, streĉi; 23. Pasinta ___ for el memoro; 25. Metodo de pago (akuzativo); 26. La ĉefa dio en la ĝermana mitologio; 27. La ekstera parto de la suna atmosfero.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

- Dolĉa manĝaĵo farita el kakao; 2. Rilata al Persujo; 3. Faco de solido; 4. Mia, via, ___ ; 5. Simbolo por osmio je kernio; 6. Ŝaŭmo kaj tumulto de marondoj; 7. Esti ebla; 8. ___ , via, lia; 9. Komence duono de ogro; 10. Venena alkaloido, ekstrakta el tabako; 12. Alveno (kontraŭo); 14. Versa verko; 16. ___ metro estas aparato, per kiu oni mezuras la aervolumenon; 17. Homgrupo konscia pri siaj diferencoj (akuzativo); 19. Havas simbolon Au (akuzativo); 20. Apo___ = farmacio; 21. ___-malpli = ĉirkaŭi; 22. Prepozicio montranta instrumenton, materion aŭ objekton; 24. Komence duono de odro; 25. Komence silabo de ĉokolado.



Post kelkaj tagoj Janko povis doni al sia amiko la sekvantajn informojn pri la mistera domo: ĝi apartenas al profesoro de la Kalkuta Universitato. De dudek jaroj li vivadas en Hindujo kun sia familio; kaj nur trifoje li jam revenis pasigi kelkajn monatojn en la urbo. La junulino estas sendube lia filino, ĉar oni scias, ke li havas nur unu infanon. Tiuj sciigoj ne estis tute ĝojigaj por Karlo.

Reveninte hejmen unu tagon, li trovis sian fratinton ploranta: la avo mortis. Gesinjoroj Davis jam foriris al lia domo kun onklo Jako, kiu venis ilin sciigi. Karlo tuj remetis sian ĉapelon, kuris al tramveturilo kaj baldaŭ alvenis en la avan domon. Suprenirinte la ŝtuparon, li kvazaŭ ne plu povis spiri. Ĉiaj ideoj kaj sentoj miksiĝis en lia cerbo. Li miris, ĉu li bone komprenis, kion Heleno diris. Ĉu vere li neniam plu vidis la bonan avon, tiel bonkoran? Lia patro malfermis la pordon kaj premante sian filon al sia brusto, lin kisis multfoje.

Karlo esploris. Lia patrino kondukis lin al la ĉambro de l' mortinto.

Tie sur lito kuŝis la avo, kun vizaĝo tute blanka. Li ŝajnis dormanta. Estis neniam rideto sur liaj lipoj, sed tamen aspekto kvieti kaj fida. Longe restadis Karlo apud la korpo de sia avo. Li repensis pri la tempo, kiam li aŭskultis rakontojn sur liaj genuoj; pri la gajaj vesperoj kun li pasigitaj; pri liaj ŝercoj kaj vojaĝaj aventuroj; pri lia bonkoreco al ĉiuj.

Iam al Karlo la avo diris: En ĉiu homo estas anĝelo kaj diablo. Tre ofte unu el ambaŭ estas multe pli potenca, ol la alia. Eĉ kiam ĝi estas la diablo ĉiam serĉu la anĝelon. Forgesu la difektojn de l' aliaj, memoru iliajn bonajn ecojn. Ĉiam parolu al ilia bona parto, neniam al la malbona. Tiel vi kuraĝigos multajn homojn kaj vin mem feliĉigos. Vi plifortigos la bonajn ecojn kaj ekdetruos la malbonajn. La avo tiel bone sciis trovi la bonajn

ecojn de ĉiu!

La tagon de l' funebro la domo de l' avo estis plena de floraj buketoj kaj kronoj donacitaj de amikoj de la familio. Vizitantoj alvenadis ĉiumomente, redirantaj ĉiam la samajn kutimajn frazojn. Kiel ĉio ĉi estis dolora, teda, dum Karlo volus esti sola, trankvila kun siaj gepatroj!

Post la diservo en la preĝejo, ĉiuj iris al la tombejo, sekvante la funebran ĉerkoveturilon. La tombejo estis malseka pro ĵusa pluvo. Ĉiuj kunvenis ĉirkaŭ senherba loko. Estis granda fosaĵo en la tero kaj planko ambaŭflanke. Oni glitigis la ĉerkon malsupren kaj ĝin tuj rekovris per tero. La pastro ekpreĝis, sed Karlo pripensis malĝoje. En liaj oreloj ankoraŭ sonis la bruo de la tero falanta sur la ĉerkon. Tien oni metis lian karan avon.

Jam la personoj disiĝis por reiri hejmen. Pasante inter la aliaj tomboj, Karlo malĝoje ekpensis pri ĉiuj, kiuj jam kuŝas tie sub la tero.

Intervjuo de Cléa Robin, Fidela membro de LES

(Fare de Francisko)

- *Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

Mi naskiĝis en Laŭzano la 18-an de marto 1946, kie mi frekventis miajn unuajn klasojn. Mia patro subestre laboris por la urbaj ĝardenoj. Poste mi eniris la Instruistan Lernejon (Ecole normale).

- *Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

Hazarde en la Grupo J.E.A.N., mi renkontis Lucienne Dovat, kiu proponis kursojn de esperanto pere de la Rika Metodo. Ŝi klarigis pri la lingvo.

- *Kiam vi decidis studi esperanton?*

En 1980, mi decidis aliĝi al la kursoj de Lucienne kaj engrupe studis kun Yvette Goy kaj Jeannette Mamin. Poste ni multfoje iris al KCE en la Chaux-de-Fonds.

- *Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

Miaj gepatroj kontentis scii, ke mi decidis studi esperanton, ĉar ili ŝatis ĝian ideon. La aliaj sciis, ke mi estas idealisto kaj ridetis iomete.

- *Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

Mia edzo Jean-Marie de ĉiam defendas esperanton kaj propagandas pri ĝi. Li provis studi kun Viktor el Hungurio, sen vera sukceso. Mi mem trijare instruis en UNIPOP en Monthey.

- *Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

Mia unua UK okazis en Pekino en 1986. Mi konatiĝis kun Claude Piron. En 2016 mi partoprenis la UK-on de Nitra (Slovakio) kaj tiun de 2018 en Lisbono (Portugaliao).

